# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 03/11/2022 Sescentsepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 682,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **300,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **153,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon **KATOJ EKKONAS SIAJN MASTROJN LAŬ LA PAROLO**
31-A DE OKTOBRO 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*



# Skribu pri via klubo




*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ DE LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).** **N.ro 10 de "Por Komencantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ**: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kio estas la gramatika objekto de la ĉefpropozicio en "Mi bedaŭras ke li manĝis la tutan torton".


2). Kio estas la gramatika objekto en "Li manĝis, tio estas li manĝaĉis, la tutan torton".

3). En "Li ĉiam estis fidela amiko" oni nomas "fidela amiko" la predikativo". Kio estas en tiu propozicio (= frazo) la predikato?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 607. . *M Leereveld.*

## Henry Neil Gribble Broadbent 22 Dec. 1929 - 15 Sep. 2022

## Plia amiko foriris.



Kvankam tio okazis antaŭ pli ol monato, nur hodiaŭ eksciis mi de lia filo, ke Henry Broadbent forpasis la 15an de septembro 2022.

Je tiu tago mi estis ankoraŭ en Francujo.

Henry kaj Betty estis fidelaj lernantoj de mia kurso en CAE ( *Council of Adult Education*) en la centro de Melburno. Poste kiam la loko estis vendita , ni migris al Ross House kaj fine aliĝis al U3A.

Dum multaj jaroj Betty kaj Henry estis tre aktivaj en la Viktoria Esperanto- Federacio , ŝi kiel sekretario kaj li kiel kasisto. Henry estis la kasisto ankaŭ de la Esperanto -grupo en 3ZZZ

Henry estis inĝeniero kaj interesiĝis pri eksterordinaraj fenomenoj de la pasinteco. Li estis kvieta, afabla homo, kiu povis moderi la ekscesojn de kelkaj "batalantoj" kiam la prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio , Igor Couto, kreis dividon en la movado.

Li interesiĝis ankaŭ pri plantoj kaj kune kun Betty foje proponis nekutimajn manĝajojn faritajn de nekutimaj fruktoj aŭ legomoj.

Ni gardu en la memoro la ĝojon , kiun ili ambaŭ alportis al nia movado.

*Franciska Toubole*



# Ŝerco traduktita el la angla:

Domservistino deziras pli altan salajron. Ŝi tion petas al la dommastrino.
Kial?, demandas la mastrino
Mi havas tri kialojn. Unue mi pli bone gladas ol vi.
Kiu diras tion?
Via edzo.
Due mi pli bone kuiras ol vi.
Kiu diras tion?
Via edzo.
Trie mi pli lerte seksumas ol vi.
Kiu diras tion? Certe ne mia edzo, li estas fidela edzo.
Eble li estas, sed efektive ne via edzo diris tion, sed alia persono kiu seksumas kun vi, la ĝardenisto.
Nu, konsentite, mi altigos vian salajron.

*Nicole Else*



**De la 24-a ĝis la 27-a de novembro 2022 okazos la 3-a** Virtuala Kongreso de Esperanto **(organizata de UEA) +** Retoso **(la reta evento de TEJO). Teknike prizorgas E@I.**

Se vi estas membro de UEA, vi povas senpage aliĝi ĝis la 18-a de novembro 2022. Aliĝu nun per https://vk.esperanto.net.

Ni kore invitas vin fariĝi **Subtenanto** de la evento (per donaco de 50 EUR aŭ supera, se tio eblas al vi). Eblas donaci dum aliĝo.

Ankaŭ helpu disvastigi la VK-n inter viaj konatuloj! La 3-a VK + Retoso estos la plej granda reta evento de la jaro! Pliajn detalojn legu ĉe https://uea.org/gk/1070

*UEA.org*

(Por pliaj informoj bonvolu skribi al vicprezidanto de UEA Fernando Maia Jr. - fmaiajr@gmail.com)

*sendis Sandor Horvath*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). “ke li manĝis la tutan torton”.
2). “la tutan torton”.
3). “estis fidela amiko”.

*Marcel Leereveld*.

**3ZZZ** La unua parto de la elsendo de la 31a de oktobro estas dediĉita al la historio de la movado ( la revuo Monda literaturo , letero de Zamenhof) . Poste la temo estas toksikomanio kaj ĝi finiĝas per optimisma vidpunkto .





*Franciska Toubale*

Paul Desailly
Re: falsa novajho en 'A'ustraliaj Esperantistoj' Tue 9:05 AM
Gekaraj Saluton

AE ne enhavas falsajn informojn

La mondo nun havas propagandojn falsajn. Mi provas ne enmeti falsajn informojn



Milionoj mortas pro tiu propagando. Se vi scias ke iu informo estas falsa sendu al mi tion, kion vi kredas estas vera kun ligo kaj mi rigardos tion. *Roger Springer*

# KVIZETO:

Forpasis 25 jaroj de kiam mia kara panjo mortis, 90 jaraĝa, je la 25a de oktobro, 1997. Ĉu vi povas memori kiuj du mondskuaj eventoj okazis en aŭgusto kaj en julio de tiu jaro?



Vidu ĉe la fino de ĉi tiu novaĵletero, por kontroli vian memorpovon. *Vera Payne*

# The Kep Enderby Memorial Lecture

Post du tagoj federala parlamentano prezentos *The Kep Enderby Memorial Lecture* kiu estas senpaga reta evento:
https://humanrights.gov.au/about/get-involved/events/2022-kep-enderby-memorial-lecture Registrado estas profesi-nivela, rapida kaj facila.

# Esperanto-klasoj senpagaj



Parenteze, Esperanto-klasoj senpagaj denove komenciĝis de frue en Obtobro ĉe The Innovation Factory. 60 Halifax St. Adelajdo. **Miraklo de mirakloj:** Inter miaj studentoj bahaano nomata Andreo, en aĝo de ĉirkaŭ kvindek jaroj, estas inter miaj 'viktimoj'. Pri bahaa (mal)enĝaĝiĝo en Esperanto aperos duonpaĝa anonco en la decembra eldono de nia internacia revuo, ESPERANTO. Amike *Paulo Desailly*

# KVIZETO de vera

La 31an de aŭgusto 1997 mortis Princino Diana, 36 jaraĝa.

La 19an ĝis la 26a de julio la 82a UK de Esperanto okazis en Adelajdo. Venis ĉirkau' 1000 homoj el 54 landoj.



(Kompreneble vi memoris ambaŭ aferojn - ĉu ne? ) *Vera Payne*

# La politiko de la mondo ŝanĝiĝas

http://thesaker.is https://www.greanvillepost.com/
http://www.globaltimes.cn/index.html https://sputniknews.com/